



Turkaj soldatoj en la urbo Afrino la 18-an de marto 2018, kiam finiĝis la invado.

REZISTANTE SUB LA OKUPACIO

Preskaŭ ok monatoj pasis(*) de kiam Turkio invadis la kurdan distrikton de Afrino. Plejmulto el la loĝantoj forfuĝis, kaj el tiuj nur malmultaj revenis. Nun ili devas alfronti krudan realecon: domperdo, sekurecmanko, senlaboreco kaj rabado...

“Mia fratino revenis en Afrinon.” Parolas Rania Ocu. “Du monatoj devis pasi, ĝis ŝi povis denove eniri sian domon, kaj, kiam ŝi tion atingis, ŝi konsciis, ke ĉiuj ŝiaj aĝoj estis malaperintaj. En la domo restis nur fridujo kun la konektkablo tranĉita, por ke ĝi ne estu utiligebla.” Tio, okazinta al la familiano de Ocu, estas ekzemplo de tio, kion trovis tiuj, kiuj revenis al la hejmlando, post kiam Turkio invadis en januaro. “Ankaŭ mi fuĝis, kaj nun mi vivas en Kobano. Tamen, mi havas grandan parton de mia familio en Afrino: fratinojn, onklon kaj gekuzojn.” La situacio de tiuj, kiuj restas tie, estas “neeltenebla”, rakontas Ocu. “Ili diras, ke vivi tie estas kiel vivi en karcero.” Kiuj ne forfuĝis kaj kiuj decidis reveni, devas plu vivi sub la okupacio.

Pasintan januaron, la turka registaro decidis ataki roĵavan distrikton de Afrino. Tiu teritorio estis sub kontrolo de la PPT(1). Tiu kurda milico estas konsiderata kiel “terorisma grupo” fare de Ankaro, pro ties rilatoj kun la PLK(2). Tiu estis la motivo, kiun trovis Erdogan por forĵeti la plejmulton el la loĝantoj de Afrino. “Ni purigos de teroristoj ĉiujn landlimojn de Turkio”, li deklaris dum mitingo antaŭ ol komencis la atako. En marto, Turkio kaj la SLA(3), grupo, kiu batalas kontraŭ la siria prezidento al-Assad, sukcesis konkeri Afrinon post trimonata lukto.

Konsekvenco de la agreso kaj venko de Turkio estas la demografia ŝanĝo. Antaŭ ol la milito komencis, en Afrino vivis 170 000 homoj, el kiuj 80 % estis kurdoj. Klaras nun, ke tiu ciferoj ŝanĝiĝis. Laŭ Unuiĝintaj Nacioj, inter januaro kaj marto 137 000 personoj foriris el Afrino. Malmultaj revenis, post kiam finiĝis la milito. Nun, plimulto el la loĝantaro de Afrino estas sunaismaj araboj fuĝintaj el al-Assad.

La situacio de tiuj, kiuj revenis kaj de tiuj, kiuj estis restintaj en Afrino, estas tre severa. Reveninte, multaj sin trovis sen siaj domoj, ĉar nun en ili loĝas SLA-membroj aŭ ties simpatiantoj. Multaj aliaj estis “bonŝancaj”, kiel diras Ocu, kaj post monatoj ili povis eniri en siajn domojn. Forfuĝante, ili devis ĉion forlasi, kaj nun, reveninte, ili trovas, ke nenio restas al ili. “Mia onklo rekuperis sian domon; kiam li eniris ĝin, li vidis, ke estas nenio. Ĉiuj liaj aĵoj estis malaperintaj.”

Krom la doma afero, la plej grava problemo estas la akiro de laboro aŭ vivnecesaĵoj. Pro la demografia ŝanĝo, la situacio komplete ŝanĝiĝis. Nun, la kurdoj ne havas eblecon akiri monon ĉar ili ne povas forlasi siajn domojn. “Antaŭ la forfuĝo, mia onklo havis kelkajn olivarbojn. Nun estas la tempo de la olivrikolto, sed li ne povas akiri liajn laborfruktojn. Ĉar li grave riskas esti forkaptita irante al la olivarbaro”, klarigas Ocu. Multaj aliaj kurdoj havas vendejojn aŭ alitipajn negocojn en Afrino, sed ili ne povas labori en ili, ĉar ili jam ne posedas ilin. Ocu klarigas, ke la polico kaj la nova administracio en Afrino konsideras la kurdojn kiel duklasajn personojn: “Neniam oni kredas nin; se io okazas al ni, la policistoj rigardas aliflanken. En Afrino ni havas nenian sekurecon.”

Tendoj por la vintro.

La situacio de tiuj, kiuj forfuĝis kaj ne revenis ne estas pli bona ol la de la revenintoj. Plejmulto vivas en la al Afrino apuda distrikto de *Xabha*. Tiu teritorio ankoraŭ estas sub kontrolo de la PPT. Aliaj, kiel Ocu, foriris al Kobano, kaj malmultaj al Ĝiziro – kurdiaj distriktoj oriente de la rivero Eŭfrato –. Plejmulto de la homoj forfuĝintaj al *Xabha* loĝas en tendoj aŭ neloĝataj domoj. La situacio krudas, sed ĝis nun ili antaŭen iris. La vintro venas, kaj alia problemo aldoniĝas al la jam tre malbona situacio: la vetero. “En *Xabha* pli malvarmas ol en Afrino. Krome, la tendloĝantoj ne havas sufiĉajn rimedojn kontraŭ la malvarmo. La nura solvo estas plifortigi la tendojn”, diras Ocu. En Kobano kaj Ĝiziro ili alfrontas la saman situacion. Ili havas nenian helpon por pluvivi. “En Kobano pli trankvilas, sed mi ne havas laboron, kaj sen laboro malfacilas vivi. Mi estas serĉanta laboron, kaj mi sendis mesaĝojn al multaj NROj, sed mi ne ricevis respondon.”

La turka agreso funde ŝanĝis la vivon de la loĝantoj de Afrino, kaj ĉies situacio estas tre angora, denuncas Ocu. “La kurdoj en Afrino vivas terorigataj, kaj la ekstere vivantaj ne havas eblecon por digne vivi. En tia situacio la vivo estas tre kruela.”

Kiam Erdogan ekis la atakon kontraŭ Afrino, la RPP(4), ĉefa opozicia partio en Turkio, subtenis lin. Informfonto el la RPP deklaris al *Berria*, ke rilate tiun ĉi aferon nuntempe estas divido ene de la partio. Kvankam la oficiala pozicio ankoraŭ subtenas la agreson, aŭdiĝis kelkaj voĉoj kontraŭ ĝi. “La politiko, kiun Turkio disvolvas rilate la afrinan aferon, estas tute damaĝa. Post paso de la tempo ni vidos la konsekvencojn de tia politiko”, deklaris Cagla, RPP-partiano, kiu ne volis doni sian tutan nomon nek pliajn informojn, ĉar tio povus esti “danĝera”.



Malmultaj eblecoj por ŝanĝo.

Kiel klarigis Cagla, la celo de ĉiuj ĉi politikoj estas forteni la kurdojn de Turkio. “Komence, Erdogan alianciĝis kun la araboj, kiuj kontraŭas al-Assadon, kaj poste kun Rusio. La celo de ĉio ĉi estas teni la kurdojn kaj al-Assadon malproksime de Turkio.”

La prezidento de Turkio ne ŝanĝis sian sintenon rilate Afrinon. “Ni ne retretos en tiu ĉi afero, ni estas flanke de la suferantaj homoj, flanke de la homoj subpremataj”, li deklaris en kunveno de sia partio – PJD Partio de la Justeco kaj la Disvolviĝo(5)–. Krome, dum la RPP ne ŝanĝos sian sintenon, li havos pli grandan sekurecon por persisti en sia dekomenca decido, eĉ se nuntempe la opozicio feblas konsekvence de la ŝanĝoj en la politika sistemo de Turkio.

Pro ĉio ĉi ne ŝajnas, ke la situacio povos ŝanĝiĝi baldaŭ. Tiel ŝajnas al Ocu. “Mia optimisma flanko diras, ke la situacio rapide ŝanĝiĝos kaj ke ni revenos. Tamen, mia logika flanko diras, ke ni devos fortege labori por reveni en nian hejmon. La mondo sin lokis flanke de la fortulo, kaj ni nenion povas fari kontraŭ la povo de la fortulo.” La kurdaj loĝantoj de Afrino ne vidas bonan eliron el la nuna situacio. “Mia fratino diris hieraŭ: ‘La kurdoj ne rezistas en Afrino, ĉar ni fortas, ni ne pluvivas, ĉar ni estas inteligentaj, ni rezistas vivaj tie ĉi, ĉar ni devis lerni ĉiam diri *jes*,’”

Por ŝanĝi la neelteneblan staton de la kurda popolo necesas 180 gradan turnon en la turka politiko. Vidinte la rezulton de la lasta balotado kaj konante la pensmanieron de Erdogan, Cagla opinias, ke tiu ŝanĝo ankoraŭ estas tro for: “La naciismo estas kreskanta, kaj la situacio en Afrino estas rezulto de tiu okazaĵo.”



Ĝihadistoj disrabantaj post la konkero de Afrino

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Popolaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Gel).
- (2) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
- (3) Siria Libera Armeo. Al-Ûayš as-Suri al-Ĥurr en la araba. Konata ofte per ĝia nomo en la angla: Free Syrian Army.
- (4) Respublika Popola Partio (RPP)/Cumhuriyet Halk Partisi (CHP), en la turka.
- (5) Partio de la Justeco kaj la Disvolviĝo (PJD)/Adalet ve Kalkinma Partisi (AKP), en la turka.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Aitor Txabbarri.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 10-an de Novembro 2018-a.

Tradukis: NXC. Novembro 2018-a. Provlegis: DS.